


KONTAKTO

numero 142 (1994:4)

La sufero,
kiun
malfacilas
akcepti:

AMOSOŬKO

- Koncentrejoj,
kiujn Usono
konstruis
- PIV estas lotumita
— kiu gajnis ĝin?
- En Rusio estas
fumo por ĉiuj
- Nova rubriko
de Sabira



Lerni de niaj eraroj	Joĉjo Truong, Usono	2
Amoŝoko	Luigi Pavarin, Italio	4
La angulo de Ludmila kaj Petro	Ludmila kaj Piotr Malicczy, Pollando	10
Krucvorto (konkurso)	Claus Günkel, Germanio	10
Christine gajnis PIV!		11
Fumo por ĉiuj	Irina Alekseeva, Rusio	11
Ĉu Tamara edziniĝos?	Claude Piron, Svisio	12
Tatara tendo	Sabira Ståhlberg, Germanio	13
La ruĝa sciuro	Franĉjo Veuthey, Nederlando	14
La blanka cikonio revenas!	Giancarlo Baraldi, Italio	15
Tentaklo		15
Baleno	Daniel Cuthbert, Usono	16

KONTAKTO

Dumonata socikultura gazeto de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), eldonata de Universala Esperanto-Asocio (UEA)

Fondita en 1963

N-ro 142 (1994:4), 31a jarkolekto

ISSN 0023-3692

Legata en 90 landoj (voĉlegata por blinduloj)

Adreso: UEA, Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando;
☎ +31 10 436 10 44;
☉ fakso +31 10 436 15 51
e-poŝto: uea@wammes.erc.eur.nl

Redaktoro: Francisco L. Veuthey

Konstantaj kunlaborantoj:

Felip Artero i Lozano (Katalunio)
Martin Burkert (Germanio)
Zoran Ćirić (Serbio)
Alberto Garcia Fumero (Kubo)
Bernard Golden (Hungario)
Georgo Kamaĉo (Hispanio)
Ludmila kaj Piotr Malicczy (Pollando)
Remigiusz Mielcarek (Kanado)
Atilio Orellana Rojas (Argentino)
Oŝhó-Davies Olúwábumni (Niĝerio)
Claude Piron (Svislando)
Anna Rachoń (Pollando)
Cláudio Rodrigues Pistilli (Brazilo)
Jozef Truong (Usono)
Ilkka Santtila (Finlando)
Sabira Ståhlberg (Germanio)

Grafika elpretigo: Roy McCoy


Prelegado: Rob Moerbeek

Presado: Grafisch Bedrijf Tuijtel

Facilingvaj artikoloj estas verkitaĵoj en la niveloj tre *facila* kaj *facila*, laŭ la vortolisto de KONTAKTO. Tiu listo aperas en la unua numero ĉiujare.

Anoncarifoj:

Tutpaĝa 675 gld., duonpaĝa 375 gld., kvaronpaĝa 205 gld., sesonpaĝa 155 gld., okonpaĝa 110 gld. Eksterakviritaj anoncoj kostas duoble. Senŝanĝe ripetita anonco (ne anonceto!) en sinsekvaj numeroj rajtas je rabato de 20%. Por movadaj instancoj: 50% rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas maklerajon de 30% el la prezo de la koncerna anonco. La abontarifo varias laŭlande. Petu informojn de la supra adreso.



enkonduko

Certege vi jam rimarkis diversajn fuŝojn en nia pasinta numero. Versajne okazis, ke en la presejo oni malfermis la diskon, en kiu KONTAKTO iras, ne per nia, sed per alia, ilia programo PageMaker. Tio do kulpas ke, ekzemple, la kursivaj literoj en la recenzo "La odoro de la papajo verda" centrigis, en la biografieto de Osho-Davies kondensigis kaj plej terure, ĉe la ŝercrakonto "La promeso", larĝigis kreante belan kaĉon en la vortareto (kiun espereble vi tamen sukcesis deĉifri!). Ni devus aldoni krome niajn proprajn erarojn, pro hasto, ĉar en rekorda tempo ni devis fini tiun numeron, por ke ĝustatempe ĝi atingu la UK kaj IJK en Koreio. Kaj fakte, ankaŭ la presejon ni premis; eble tial ili ne tro zorgis pri la fina rezulto — kvankam la miso en la traduko de Cláudio estis ege evidenta. (Grrr...!)

Sed jen nova KONTAKTO, espereble malpli fuŝita, kun aparte longa ĉefartikolo. Sed ĝi estas ja interesa kaj, antaŭ ĉio, taŭga. Eble iam vi bezonos relegi ĝin... Kaj tiuj, kiuj sopiras Nasreddin Hoca, ekgoju: Sabira ĵus starigis tataran tendon sur paĝo 13.

Belan printempon por sudanoj kaj rezignacion por nordanoj!

Franĉjo

Lerni de niaj eraroj

Joĉjo Truong, Usono

Inter 1942 kaj 1946, ĉirkaŭ 120 000 homoj travivis terurajn koncentrejojn. Ili perdis ne nur sian domon kaj laboron, sed ankaŭ sian liberecon kaj kredon je la reg-istaro. Ne, ni ne parolas pri la naziaj* malliberejoj. Tiuj ĉi kaptitejoj troviĝis ne en Eŭropo, sed en Usono.*

Kial la usona registaro konstruis "koncentrejajn tendarojn" por japanaj-usonaj civitanoj? Serĉante respondon por tiu demando kelkaj povas supozi, ke la registaro devis konstrui ilin "pro sekurecaj kialoj". Sed, kial ĝi ne konstruis koncentrejojn ankaŭ por la germanaj aŭ italaj usonanoj, kies hejmlandoj ankaŭ batalis kontraŭ Usono tiam? Ni devas tamen veni al bedaŭrinda respondo: la registaro ne konstruis la kaptitejojn por protekti la landon, sed simple por detrui* la vivon de la viktimoj*, la japanaj usonanoj.

Por kompreni, kial la registaro malamis ilin, oni devas unue koni la historion de la japanaj usonanoj en Usono. La unuaj japanoj atingis Usonon en 1884. Preskaŭ 24 000 japanoj laboris en okcidenta Usono en farmoj*, arbaroj kaj fervojoj. Per sia mono multaj el ili aĉetis aĉan teron, ekzemple sekegan, malriĉan, kaj igis ĝin fruktodona. Baldaŭ, ili komencis kreskigi pli da legomoj ol blankuloj, mirigante aliajn terkulturistojn kaj la terkulturistajn unuiĝojn.

armeo: la tuta militista forto de unu ŝtato

bombardi: ataki dum milito per detruiloj ĵetataj el flugmaŝinoj

civitano: homo, ĝuanta la politikajn rajtojn de iu ŝtato

detrui: malkonstrui

enmigri: (= en-migri) veni en fremdan landon por vivi tie

farmo: domo kun kampoj kaj ĉio necesa por terkulturo

fidela: plenumanta siajn promesojn. Ne agi kontraŭ io aŭ iu, kiu kredas je oni

fido: senti sendanĝerecon pri iu aŭ io

filozofo: pensisto

gardi: prizorgi; ĉirkaŭrigardadi por certigi, ke nenio malbona okazas

getto: urboparto, kie judoj devis loĝi laŭ ordono de la urbestro

ju pli... des pli: (kiom pli... tiom pli)

koncentrejo: ejo, kie oni kolektas homojn por faciligi ilian vivon dum malfacilaj tempoj aŭ por puni ilin

kortumo: aparte grava juĝantaro

najbaro: homo, kiu loĝas apude

nazio: sekvanto de Hitlero

oficiala: publika, registara, deviga al ĉiu

proklamo: oficiala, publika anonco

sekureco: sendanĝereco

tendo: portebla, malkonstruebla loĝejo el dika ŝtofo kaj lignaj aŭ metalaj teniloj

viktimo: persono suferanta aŭ mortinta pro iu ago aŭ okazaĵo

facila



Koncentrejoj troviĝis en solecaj, aĉaj lokoj. Jen tiu en Heart Mountain, Vajomingo. Tie ĉi vivis pli ol 10 000 homoj.

Ju* pli riĉaj la japanoj fariĝis, des pli kreskis la kontraŭ-japanaj sentoj. En 1907 la registaro subskribis leĝon, kiu ne permesis al japanoj enmigri* plu. Post kelkaj jaroj, la japanoj ne plu rajtis aĉeti teron. Ili devis loĝi nur en la gettoj*. Iliaj infanoj devis lerni en apartaj lernejoj. La novaĵoj, lokaj kaj ŝtataj registaroj kaj organizoj konstante atakis tiujn civitanojn. Kvankam ili helpis krei kaj konstrui la landon, neniu volis helpi ilin. Ili estis solaj en la mondo.

La malfeliĉa vivo de la japanaj usonanoj daŭris "trankvila" ĝis 1940. La 7-an de decembro 1941 ilia vivo subite ŝanĝiĝis: la japana armeo* bombardis* la usonan armean centron Pearl Harbor. La registaro fine konsentis ekbatali kontraŭ Japanio. Preskaŭ ĉiuj estis kontraŭ la japanaj usonanoj nun! Laŭ la vidpunkto de multaj usonanoj, helpi la japanajn usonanojn egalas helpi la malamikon. Malverego, ĉar la japanaj usonanoj amis Usonon kaj estis fidelaj* al la registaro. Sed en la sekva jaro, 1942, la registaro komencis sendi la japanajn usonanojn loĝantajn en okcidenta Usono al koncentrejoj.



En armea ordo infanoj ripozas en Tule Lake, Kalifornio. Tia "ordo" regis ĉiujn momentojn de la familia vivo, grave perfortante ĝin.

Entute estis dek grandaj "koncentrejaj tendaroj" kaj kelkaj, pli etaj kaptitejoj. Ili ĉiuj estis rapide konstruitaj, praaj kaj tre bazaj. Kutime 5 000 homoj loĝis en la etaj kaptitejoj, dum inter 7 000 kaj 18 000 loĝis en la tendaroj.

La vivo estis nek tiel kruela kaj terura kiel en la naziaj militkaptitejoj, nek bona, ĝuebla aŭ normala. La vivo estis, kompreneble, tre baza. Mankis eĉ pordetoj inter la necesejoj. La kaptitoj ne rajtis havi ion krom vestaĵoj kaj aliaj bezonataj havaĵoj. Ili devis fari ĉion kune, ekzemple ĉiuj manĝis en sama, granda ĉambro. La vetero ĉiam estis aĉa, aŭ estis tro malvarme aŭ tro varmege, aŭ tro seke. Troveblis ĉie multaj gardistoj*, kiuj jen kaj jen mortigis iun, kiu klopodis foriri. Ok japanaj usonanoj mortis tiamaniere.

Kvankam la registaro ege mistraktis la japanajn usonanojn, tiuj ĉi restis fidelaj al la nacio. Fakte, 1 500 japanaj usonanoj el la kaptitejoj volonte batalis en la usonaj ter- kaj aerarmeo dum la Mondmilito. El tiu nombro, 680 mortis. Poste, tiuj kuraĝaj homoj gajnis pli ol 9 500 militajn premiojn.

En decembro 1944 la Supera Kortumo* (la plej alta kortumo en Usono) sciigis, ke la registaro ne rajtis kapti fidindajn* usonanojn. Komence de 1945 plejparto

de la japanaj usonanoj iris hejmen. (Tamen, la lasta kaptitejo ne malfermiĝis ĝis oktobro 1946). Kiam la japanaj usonanoj revenis al siaj hejmurboj, ili revenis ankaŭ al la malamo kaj malamikeco de siaj blankulaj najbaroj*. Ili devis rekomenci la laboron, krei novan vivon.

Iom post iom, la registaro ŝanĝigis. En 1949 japanaj usonanoj denove rajtis aĉeti kaj havi teron; en 1952 japanaj civitanoj povis fariĝi usonaj civitanoj. En 1976 prezidento Gerald Ford oficiale* diskonigis,

ke la registaro faris gravan eraron kaptante la japanajn usonanojn dum la Dua Mondmilito. Laŭ la oficiala raporto, la tiama registaro ne havis iun ajn justan aŭ laŭleĝan kialon konstrui la koncentrejojn. Fine, en 1988, prezidento Ronald Reagan konsentis pagi al unu vivanta japana usonano, kiu iam loĝis en la kaptitejoj, 20 000 usonajn dolarojn. El la 120 000 japanaj usonanoj travivintaj la koncentrejojn, nur 60 000 restas.

En sia proklamo pri la japanaj usonanoj en 1976, prezidento Ford skribis: "Lerni de niaj eraroj ne estas agrable, sed kiel granda filozofo* iam diris, ni devas fari tion, se ni ne deziras ripeti ilin." □

En Vogezoj, montaro de orienta Francio, japanaj usonanoj marŝas al la batalejo. Ankaŭ en la aerarmeo ili batalis.



Amoŝoko havas sian originon en rompiĝo de ama rilato, jen pro morto de unu el la paro, jen pro decido de, ĝenerale, unu el ili. Usona d-ro Stephen Gullo estas inter la unuaj, kiuj dediĉis sin al la studo de tiu terura sufero kaj donis nomon al ĝi. Lia libro *Loveshock* (Amoŝoko) helpis milojn da amsuferantoj.

Amoŝoko estas ne malsano sed neevitebla procezo, kiun ĉiuj suferas almenaŭ unu fojon en la vivo. Jen decida momento por kresko kaj emocia disvolviĝo pri kiu oni ne devas honti aŭ furiozi: tiu dolorego estas nur pruvo, ke oni kapablis tiom multe ami. Fakte, ne sperti amoŝokon post serioza amrilato signifas esti malŝaltita de la emocioj.

Amoŝoko ne estas en si mem malsano, sed se tre profunda kaj longedaŭra, ĝi ja povas malfortigi la imunsystemon kaj igi onin tendenca ricevi veran malsanon. Aŭ oni povas komenci mem detruiri sin. Gravus do, ke oni sukcesu eliri el ĝi. Por efike fari tion ekzistas diversaj teknikoj, kiujn vi legos en tiu ĉi artikolo. La celo estas antaŭeniri en ĝi kaj esti kapabla bone funkcii: labori, manĝi, dormi. Por ke vi havu ideon pri la dimensioj de la problemo, mi tradukis jenon el la libro jam menciita:

La reĝino trairis la palacon histerie plorante. Dum ŝi lamentadis en la nokta silento, ŝiaj ĉambelaninoj interŝanĝis timoplenajn rigardojn. Eĉ la plej bonaj kuracistoj povis fari nenion por malpezigi ŝian doloron. Ankaŭ al medianoj oni turnis sin, sed estis neeble, ke princo Alberto revenu el la mondo de mortintoj. Li estis for, kaj ŝi povis fari nenion kontraŭ la morto, kio por ŝi estis neeltenebla.

Laŭ la paso de la semajnoj, la palaco iom post iom iĝis la malliberejo de reĝino Viktoria. Ene de tiuj muroj ŝi ne povis fuĝi de la memoro pri Alberto, nek de la ideo, ke neniam plu ŝi povos preni la manojn de la princo inter la siajn, nek aŭdi lian voĉon, nek senti lian plaĉan brakumon. Finfine, turmentita de la memoroj kaj tute senkonsola, ŝi fuĝis de la Palaco de Buckingham kaj regis el tiu libervola ekzilo dum la tridek sekvaj jaroj. Ekde tiam oni konis ŝin kiel la Vidvinon de Windsor, ŝi konstante portis funebrovestaĵon kaj pasigis la tempon irante de unu al alia reĝa domo en Windsor, Osborne kaj Balmoral.

Tiel granda estis ŝia doloro, ke ŝi kondamnis la tutan britan imperion al sia amoŝoko. Sombra vestado, aŭstereco, rigideco... la viktoria erao estis vera funebroepoko, respeguliĝo de la doloro de reĝino Viktoria kaj ties amoŝoko.

Amoŝoko estas normala fenomeno kun simptomoj, fazoj kaj okazaĵoj konataj, kun komenco kaj fino. Ĝi havas ses etapojn, kiujn oni devas trapasi laŭ sia propra ritmo. Ne la rapideco, sed ke oni trairu ĉiujn etapojn gravas. Ili estas ŝoko, doloro, kulpigo, rezigno (la "adiaŭo"), rekonstruo kaj eliro.

Ĉar amoŝokon travivas homo kaj ne maŝino, ni ne povas diri, kiom gi daŭras nek atendi, ke de unu etapo oni iru al la sekva rekte. Ofte oni retroiras al la antaŭa etapo, denove avancas, poste refoje iras malantaŭen. Tio plej ofte okazas inter la dua kaj tria etapoj, kiuj estas la plej koŝmaraj. Tiun fenomenon de revenado d-ro Gullo nomas "zigzagado". Krome, la etapoj ne havas difinitan daŭron; ili varias laŭ ĉiu kazo.

AMOŜOKO


Kaj ekzistas ankoraŭ io, kontraŭ kio necesas konstante lukti dum la "vojaĝo" tra la amoŝoko: la *amkaptiloj*.

Sed nun imagu, ke vi ĵus falis tra truo surstrata kaj subite troviĝas en malluma tunelo.

Ŝoko, la granda bato

Jen la komenco: pro la falego vi sentas vin paralizita kaj malorientita. Via vivo estas kvazaŭ filmo, kiu subite haltis ruliĝi. Eble vi eĉ ne kapablas manĝi aŭ dormi: vi iĝas vera zombio¹. Kion vi faras, misfunkcias. Kiam vi superos la ŝokon eble vi memoros nenion aŭ nur fragmentojn de ĝi: tiel via menso protektas vin de la bato spertita dum la emocia traŭmato. La ŝoko povas daŭri inter tago kaj monato, malofte pli.

Fotis Franĝjo. Poetis Mariazinha Monteiro



Doloro

Vi lamentadas ne nur la perdon de la amata homo, sed la belan tempon pasigitan kune, la komunajn planojn, la maleblon de kuna vivo. Vi povas iĝi tre agaciĝema, malbonhumora kun viaj amikoj aŭ kolegoj. Vi ankaŭ evitas ilian helpon, ĉar ili ne komprenas vian bezonon lamenti.

Vi sentas fortan impulson telefoni al la alia homo sed io bremsas vin. Nekredeble, ke vi tiel timegas, se pensu, ke antaŭe vi povis brakumi lin² kiam ajn vi volis. Vi ankaŭ sentas profundan ĉagrenon pro tio, ke dum vi eĉ dormi ne povas, la alia ŝajnas havi tute trankvilan vivon. De tio al la deprimado estas unu paŝo. Vi sufokiĝas sub malespero. Atentu: kiel reĝino Viktoria, vi povas resti kaptita en tiu ĉi etapo!!! Tiam vi ne plu eltenas kaj devas ekserĉi helpon.

Vi povas havi emociajn kaj histeriajn eksplozojn antaŭ io, kio retrobildigas vian antaŭan rilaton. Vi povas sperti eĉ ekstremajn reagojn.

Jes, jam temp' está por peti helpon de familianoj kaj amikoj. Vi devas eviti tion, kio reagigas vin aŭ kaŭzas deprimon: se nun vi devas iri sola al la superbazaro kaj tio memorigas vin pri viaj antaŭaj aĉetoj tie kun via amato, petu ke alia faru tion por vi. Ankaŭ serĉu "konsolnumeron": amikan telefonon, kiun vi povas voki senĝene, kiam la angorego atakas vin. Interkonsentu kun iu bona amiko, ĉu li pretas babili kun vi dum viaj krizaj momentoj.

Amoŝoko povas daŭri mallonge aŭ longe, eĉ tre longe. Ĝi estas vere terura periodo, dum kiu vi sentas vin izolita, for de ĉio. Via libera tempo, kiun antaŭe vi dediĉis al via amata homo, tiuj belaj horoj nun estas for por ĉiam kaj vi sentas vakuon ene de vi. Estas horo reagii!

La obseda pensado pri la bela vivo de via eksamato, dum via propra senespere forbrulas, povas esti tute falsa. Konsciu, ke post la rompo de serioza amrilato ankaŭ la alia suferas!

¹ Viva mortinto

² Mi uzas la masklan formon tra la artikolo nur pro konsekveneco.



Vi ĵus rompís kun via amato, sed ekde tiam ne eblas bone dormi, via pacienco facile elĉerpiĝas kaj la koro ne ĉesas dolori. Via vivo komencas disfali antaŭ viaj propraj okuloj, kiel lud-karta kastelo. Kion vi trasuferas havas nomon, amoŝoko, kaj eblas superi ĝin.

Luigi Pavarin, Italio

Akiru novajn bonajn kutimojn: ekpartoprenu ekzercoprogramon, meditadoŭ aŭ komencu praktiki iun aktiveton, kiu malstreĉigas kaj ĝojigas vin. Ekzemple tiun projekton, kiun vi de-longe planas kaj por kiu ĝis nun mankis tempo. Provu dediĉi viajn energiojn al tio, kio vere donas plezuron al vi. Vi povas disvolvi vian kreivon: lerni ceramikon, ekpentri, aŭ lerni fotadon. Aŭ partopreni kurson pri jogo, aŭ komenci kuri!

Se vi spertas fizikajn dolorojn, digesto-prokrastojn, korbategon, iru al kuracisto.

Estus bone, se vi povu forvojaĝi unu semajnon. Sed nur se viaj okupoj tion permesas. Perdi la studon aŭ laboron nur pligravigus vian situacion. Devigu vin funkcii. Koncentru vian atenton al via laboro, sporto aŭ hobbio!

La valoro de distraĵoj

Distraĵoj tre grave rolas kiel absorbiloj de via emocia sufero. Estu saĝa: anstataŭ perdi monon

S.O.S.! Mi ne sukcesas dormi!

Eble dum via ŝoko vi spertus malfacilaĵojn por endormiĝi. Se vi havas bankuvon provu longajn banojn en varma akvo, eble aŭdante mildan muzikon. Aŭ se aŭdi voĉojn trankviligas vin, dormu kun la televidilo enŝaltita. Kuri vespere antaŭ ol enlitiĝi ankaŭ helpas!

Se vi subite vekiĝas je la tria frumatene ĉar via eksamato premis vian sonĝon, komencu fari ion por fortimigi lin! Se vi ŝatas teksti, tenu do ĉemane viajn teksilojn. Aŭ havu sur via noktobleno vian legatan romanon kaj ek al ĝi. Post duonhoro la maldormo estos for kaj vi povos trankvile pluripozi.

sendante multekostajn donacojn (kiuj eble revenos) al via eksamato, investu vian monon en io por vi. Engaĝiĝu en io bona. Ekzemple, ĉu ne estas tempo, ke vi aĉetu grundon kaj komencu konstrui vian domon? Se vi ne havas monon por pagi planiston, estu mem la arkitekto! Aŭ eble jam estas tempo okupiĝi pri la publikigo de viaj rakontoj. Kaj eĉ pli amuze: nun vi vere havas la eblon fari tion, kio ĝenis vian amaton! Ĉu lin ĝenis Esperanto? Komencu partopreni kongresojn aŭ perfektigajn kursojn (aŭ eklernu alian lingvon). Ĉu li ne toleris dorlotbestojn? Adoptu paroleman papagon aŭ pufan katon! Hejmaj bestoj estas nesupereblaj amikoj por tiaj situacioj.

Ŝinjoro Solec'

Jen unu el la fantomoj, kun kiuj vi devos lerni kunvivi: la soleco. Sed vidu, ĉio havas sian pozitivan flankon: multaj pasas rekte de la gepatroj al la parulo, sen havi vere la eblon sperti "fraŭlan" vivon: jen ŝanco! Oni povas fari, kion ajn oni volas! Sed ni agnosku, ke komenci vivi sola povas esti neelteneble en la unuaj tempoj.

Ĉefe dum semajnfinoj, antaŭ la enlitiĝo kaj dum la ferioj vi sentos vin sola. Temas pri necesa malbono, al kiu vi nepre adaptiĝos. Sed vi ne devas stoike traplori ĝin: invitu viajn amikojn vespermanĝi, organizu mem iun ekskurson aŭ esplorvojaĝon. Aliĝu al Pasporta Servo: tio portas novajn homojn al via domo!

Ekzistas tiom da eblecoj por distriĝi kaj entute disvolvi novajn kapablojn. Se vi ne scias naĝi, ĉu jam ne estas tempo lerni? Aŭ finfine kleriĝi pri klasika muziko, pri kiu vi estas vera anal-fabeto. Kaj kio pri la Esperanta literaturo?! Aŭ eble vin pli allogas kino. Kaj se vi ŝatas defiojn: kial ne komenci praktiki tiun sporton, kiun vi neniam imagis ŝati? Aŭ lernu danci!

Se vi loĝas en izolita regiono aŭ malgranda vilaĝo certe la ebloj ne estos multaj, sed vi povas, ekzemple, komenci mem gvidi kurson aŭ iĝi volontulo: helpanto ĉe via loka hospitalo aŭ fajrestingisto. Tio klare montros, ke vi ankoraŭ kapablas doni multon. Ĉiel ajn, vi konos aliajn homojn kaj vide, ke ne nur vi havas malfacilaĵojn kaj certaj pasigos belajn momentojn kun novaj kamaradoj. Kion ajn vi elektos, tio donu ĝuon al vi. Sed zorgu ne iniciati novan rilaton! Vi ankoraŭ ne estas preta por tio!!!

Se vi estas unu el tiuj "brilaj homoj", iel sukcesaj en la vivo, akcepti la ŝokon povas esti eĉ pli malfacile. Kial? Ĉar vi simple ne povas kompreni, kiel via amato povis forlasi vin por iu alia, kiu verŝajne estas malpli talenta kaj bela ol vi. Sed tiaj aferoj okazas. Konsideru, ke amo

Teknikoj de malstreĉiĝo

Inter la diversaj teknikoj de malstreĉiĝo aparte taŭga por kazoj de amoŝoko estas tiu de Jacobson. Li estis, cetero, fama korkuracisto. Jen:

Malkroĉu la telefonon kaj certigu, ke neniu interrompos vin. Kuŝiĝu aŭ komforte sidigu. Fermu la okulojn kaj aŭdu la melodion de l' spirado. Ellasante la aeron ripetu al vi mem: "Trankvilo kaj malstreĉiĝo". Post unu aŭ du minutoj tiel, okulojn fermitajn, enspiru kiel eble plej profunde kaj retenu la spiron ĉirkaŭ 30 sekundojn. Elspiru. Reenspiru profunde, ĉi-foje sentante la tutan doloron, koleron, solecon kaj deprimon, kiun vi sentas al vi mem aŭ al la alia. Kiam vi pretas, ellasu la aeron. Nun ekatentu pri la malrapida kaj profunda spirado dum momento, antaŭ ol komenci la sekvan parton de la ekzerco.

Plu spiru malrapide sed profunde kun la okuloj fermitaj kaj ekstreĉu viajn muskolojn. Komencu per la piedoj kaj supreniru tra la cetero de la korpo. Streĉu la krurojn, gambojn, stomakon, bruston, kolon, vizaĝon, ĉirkaŭokulajn muskolojn, brakojn, manojn kaj fermu la pugnojn. Kiam vi estos tute streĉita imagu, ke vi estas ligna peco. Retenu kiel eble plej multe la spiron. Se vi sentas deprimon, malĝojon, koleron, jen la momento liberigi de ĝi!

Same kiel vi agis laŭ partoj de la korpo por streĉi ĝin, nun ekmalstreĉu ĝin en la inversa ordo profunde kaj malrapide spirante ade, sentante vin malstreĉita, ĉiam pli kaj pli. Estas normale senti, ke via korpo ŝvebas, aŭ ke vi kuniĝis kun la lito. Restu en tiu stato dum proks. 5 minutoj. Poste, por ekreveni al la normaleco imagu, ke vi kuŝas sur belega plaĝo, dum vi havas kompletan regon super via vivo. Sentu vin feliĉa, memrega kaj dum vi sentas tion, kalkulu ĝis tri. Kiam vi venos al "tri", diru al vi mem: "Mi mastras mian vivon. Post ĉio sperita, mi ne permesos, ke la malespero kaptu min". Kaj malrapide eklasu tiun staton. Ankaŭ dum kuŝobano eblas praktiki tiun ĉi ekzercon.

estas sento, kaj por ke ĝi ekestu, ne necese devas ekzisti iu kredebla kaŭzo. Multaj homoj vere ne scias, kial ili enamiĝas al iu.

Vi tamen vidos, ke en la fino de la amoŝoko vi estos eĉ pli sekura kaj sukcesa ol iam ajn, ĉar intertempe la doloro maturigis vin. Eble post la amoŝoko vi estos pli humila, pli alirebla por homoj ne tiel sukcesaj kiel vi.

Kulpigo

Kiam la doloro mildiĝas, vi klopodas trovi sencon en la okazintaĵo. Vi komencas analizi, kiu kulpas: "Kion mi fuŝis? Kion fuŝis mia parulo? Kion ni ambaŭ fuŝis?" Vi bezonas serĉi kulpulojn, ankaŭ ĉe la ĉirkaŭantaj homoj ĝenerale kaj ĉe la cirkonstancoj: ekonomiaj problemoj, neoportuna translokiĝo, sano ktp.

La plej forta emocio, kiu venos kun la doloro, estos kolero. Vian koleron vi povas direkti al via kunulo, pro la damaĝo kaŭzita, aŭ al vi mem, konsiderata fiaskulo. Trouzo de alkoholo, narkotaĵoj kaj seksa senzorgo estas manifestiloj de kolero al si mem. Kelkaj povas konsideri eĉ memmortigon. Temas pri sindetruo.

Superinte la koleron, vi eble komencos novan rilaton, per kiu senkonscie vi venĝos kontraŭ la alia homo. Eble vi ne rekte atakos vian novan koramikon, sed ne doni sufiĉan amon, resti fizike for kaj esti indiferenta ĝenerale estas ankaŭ formoj mistrakti. D-ro Gullo nomas tion *ama venĝo*. Vi projekcias sur alian, senkulpan homon, tion, kion oni faris al vi.

Kolero kontraŭ la alia povas multe helpi vin, ĉar tiam vi ekrimarkas, ke eble la alia ne donis tiom, kiom ŝajnis al vi unue. Vi do ekuzas la koleron konstrue por remasoni vian memestimon.

Preta eniri la kvaran etapon, rezignon, tre eble vi zigzagos inter kulpigo kaj doloro.

Rifuzanto aŭ rifuzato?

Tiu kiu pli suferas estas tiu, kiu pli engaĝita estis en la rilato, ĉar li dediĉis pli da tempo kaj energio al ĝi. Perdante vian rilaton vi perdas parton de ĝi kaj la energio, kiun vi kutimis doni, nun ne plu trovas celon kaj tiu tempo restas vakua, trua.

Tiu, kiu metas punktofinon al la rilato pli rapide trairas la amoŝokon. Foje eĉ ankoraŭ vivante kun la alia li jam trairas la ŝokon kaj nur en ties fino, dum la *rekonstruo* aŭ *solvo* li rompas la rilaton. Sed tio ne signifas, ke la rifuzanto ne suferas amoŝokon. Foje estas eĉ pli terure, ĉar temas pri nevola rifuzanto: Li ĉesigis la rilaton ĉar li *devis* tion fari. Ekzemple vivi kun alkoholulo, narkotulo aŭ simple kun homo, kiu ne donas sufiĉan atenton kaj amon. Jen la tipa kazo de tiu, kiu forlasas la amaton sed revenadas al li en sia (mal)espero trovi lin ŝanĝita. Li estas viktimo kaj kulpulo samtempe. Se vi estas en tia situacio, ne revenu al via amato sen antaŭe havi seriozajn dialogojn kun li kaj konkretajn pruvojn, ke li ja ŝanĝiĝis kaj sekve la rilato ŝanĝiĝos. Se estas tiel, la etapo

*Kolero pro la disiĝo,
kolero al la alia,
kolero al vi mem!
Por "puni" vin, eble vi
turnos vin al alkoholo,
narkotaĵoj aŭ senzorga
seksumado. Tio tamen
neniel helpos restarigi
vian damaĝitan
memestimon.*



de la rekonstruo estas bona por reveni. Aliflanke, la ŝoko povas finiĝi en kiu ajn etapo. Korektinte la miskonduton, kiu kaŭzis la rompon, vi povas reveni al la rilato ĉar ties dinamiko estos alia. Ankaŭ eblas turni vin al komuna terapio kun via parulo por mildigi la doloron de la disiĝo aŭ klopodi entute savi la rilaton.

Sed kompreneble, estas la forlasito, kiu vivas en vera infero. Kun la penso pri la perdita amo foriras la memamo. En tiu ĉi, la dua etapo, oni povas tute droni, agi kvazaŭ kamikazo, perdi siajn amikojn kaj vidi sian vivon estingiĝi. Vi devas konscii, ke vi ne estas la unua en tia situacio kaj vi estas nur en tunelo, el kiu ja eblas eliri! Vi ne pereos!!!

Kiom rapide mi superos mian krizon?

La rapideco ne vere gravas, sed ja ke vi solvu ĉiujn konfliktojn de unu etapo antaŭ ol eniri en la sekvan. Kaj ne forgesu la perfideman zigzagadon. Povas okazi, ke eĉ kiam vi jam iniciatis novan rilaton kaj estas tute feliĉa kun ĝi, vi foje spertos iun subitan malĝojigon. Apliku, kion vi lernis, por profiti de ĝi.

Ĝuste el tio konsistas la plej granda valoro de la amoŝoko: maturigi emocio kaj plifortigi sian kapablon rilati kun aliaj kaj alfronti estontajn perdojn. Kaj fakte ankaŭ fine de la ŝoko vi povos sperti eĉ terurajn retroirojn kun profunda doloro.

Kion fari, se oni subite malesperiĝas meze de publiko?

Se meze de publika loko vi ekspertas malesperokrizon, prenu kelkajn minutojn por jeno: sidiĝu kaj trankviliĝu profunde en- kaj elspirante. Komencu streĉi ĉiujn muskolojn, de piedoj (kiel en la antaŭa ekzerco) ĝis la kapo. Se estas homoj ĉirkaŭ vi ne necesas, ke vi fermu la okulojn aŭ streĉu la vizaĝon. Kiam via tuta korpo iĝis "ligno", kunigu la polekson kun la montroringo (de unu aŭ ambaŭ manoj) tiel, ke ili formas "o". Premu tiujn fingrojn plej forte. Dum la premado sentu, ke la malespero eskapas tra tiu "o" eksteren kaj ripetu al vi mem: "Ĝi eskapas, ĝi eskapas". Kiam vi pretos, apartigu ilin imagante, ke tra ili forfuĝas via tuta malespero, per unu bato. Ripetu tri- aŭ kvarfoje.

Ne forgesu regule aktivigi vian korpon! Pagi por gimnastiko estas unu el la plej bonaj investoj, kiujn vi povas fari. Ekzercado plimultigas la produktadon de neŭrokemia substanco nomata endorfino, kiu helpas redukti la malesperon kaj pligrandigas vian bonan humoron. Krome, vi komencos aspekti pli bone. Ofte amoŝoko lasas la viktimon pala kaj velka. Tiel granda emocia sufero ja respuguliĝas sur la vizaĝo.

Sed ankaŭ ĉi-foje la tempo havas la lastan vorton; estu certa, ke la fino alvenos.

Ne klopodu rapide trairi la etapojn laboregante duoble ol antaŭe, ekzemple, ĉar tio povas nur sendi vin al hospitalo pro troŝarĝiteco. Nek klopodu bagateligi vian suferon: ne eblas nei sentojn! Por povi eliri el la amoŝoko unue vi devas akcepti, ke vi traspertas ĝin. Krome atentu, ke la dua kaj tria etapoj estas tre danĝeraj: vi povas resti kaptita en ili.

Kvin amkaptiloj

Estas kvin diversaj kaptiloj, kiujn vi devos esti preta alfronti: la *dependemo*, la *novaj ligoj*, la *fenomeno de la papilio-ĉe-la-flamo*, la *fuĝo tra ekscesoj* kaj la *aĉeto pro komparoj*.

En la *dependemo* vi pensas la tutan tagon pri li, kion li faras, kun kiu li estas. Vi telefonas al li aŭ sendas mesaĝojn. Vi ne povas dormi. Nu, kiel solvi la impulsegon telefoni aŭ leteri al la amato? Sekvante la "terapiion de la dikulino". Kion? Jes, samĉiel gedikuloj gluas slipojn "stop!" ĉien kaj ĉefe sur la fridujon, agu same, ĉi-kaze ne kun la fridujo sed kun la telefono. Diru al vi mem "sufiĉas!" kaj ekokupiĝu pri alia afero.

Troigo estas alia kaptilo, en kiun vi falos. Vi troigas supozante, ke dum via koro estas detruita, la alia grandioze diboĉas. Apliku la teknikon de l' "stop!". Ankaŭ faru liston kun ĉiuj pozitivaj aspektoj de via vivo, ekzemple: bela



loĝejo, bona laboro, bela aspekto, bonegaj amikoj, ktp. Kroĉu ĝin al via spegulo kaj legadu ĝin laŭte, komencante per "Mi havas..." Se via memoro troigas la virtojn de la alia, ripetu la proceduron kun listo de ĉiuj liaj malvirtoj.

Alia el la kaptiloj estas la *novaj ligoj*. Eble vi komencos serĉi alian vivkunulon. En via malespero forgesi la antaŭan vi klopodegos reenamiĝi. Aŭ des pli fie: vi simple utiligos alian homon por ke via eksamato sentu ĵazulon, kaj eĉ eble faros al la nuna tion, kion la alia faris al vi. Sed antaŭsciu, ke eĉ se vi efektive trovos iun tre senhelpan, kiu lasos sin viktimiĝi pro vera amo al vi, vi mem laciĝos kaj finfine retrovos vin kaptita en la amoŝoko. Estas tre grave ne iniciati alian rilaton antaŭ ol definitive kuraciĝi. Ne fuŝu alies vivon. Vi ne rajtas.

Anstataŭ kapti iun "viktimon", estos tiom multe pli saĝe kapti kajeron kaj skribilon kaj komenci verki taglibron. Verŝu en ĝin vian koleron. Eĉ se vi sukcesas verki nur du frazojn tage, faru tion! Poste vi povos trafolumi kelkajn paĝojn kaj kontroli, kiel evoluas via amoŝoko. Matene skribu, kion vi ĝenerale sentas, kaj nokte analizu vian reagon pri viaj ĉirkaŭantoj kaj en la travivitaj

Ekzerco kun la objektoj de kuneco

Ĝi konsistas el liberiĝo de ĉiuj objektoj de la eksa rilato, kiuj malbone influas sur vin. Ili generas multajn el viaj malfeliĉaj momentoj kaj malebligas, ke vi liberiĝu de la energio de la alia homo. Vi devas preni ĉiun el ili kaj rakonti, kion ĝi signifas. Konservu nur tiujn, kiuj havas pozitivan rolon sur vin; la aliajn forĵetu, donacu aŭ vendu. La ekzercon vi povas realigi kun iu amiko, familiano, pastro aŭ terapiisto, kiu apogas vin. Sed se vi ankoraŭ ne estas preta por tio, kaŝu la objektojn provizore ie. La celo estas ne kontakti ilin ĉiutage! Valorajn objektojn prefere vendu, tiel vi malpli sentos ilian perdon. Se vi faras la ekzercon sola, tuj post ĝi signu la komencon de nova etapo: invitu amikojn kafumi, vidu amuzan filmon, iru al masaĝejo, aŭ donacu al vi mem ion deziratan.

Kaj ĉar jam ni parolas pri liberiĝo de objektoj, se vi ankoraŭ ne liberiĝis de la ĉefa objekto, via eksamato mem — vi ambaŭ ankoraŭ loĝas kune aŭ ial unu devas vidi la alian ofte, la tuta ŝoko povas esti pli malfacila. Klopodu eviti tiajn renkontiĝojn.

situacioj. Tiu ĉi taglibro helpas vin objektivigi viajn sentojn. Ju pli via objektiveco kreskos, des pli via kolero diluiĝos.

La fenomeno *papilio-ĉe-la-flamo* estas unu el la plej detruaj eroj de la amoŝoko. D-ro Gullo komparas la viktimon kun papilio, kiu blinde allogite de la lumo obstine ĉirkaŭflugas la flamon, kvankam tiu ĉi lasta ĉirkaŭronĝas ĝiajn flugilojn. Vi do sendas donacojn, telefonas, embuskas la homon, sed interŝanĝe ricevas nur indiferentecon kaj rifuzon. Vi entute forgesas pri humiliĝo kaj, kio plej danĝeras, vi eĉ povas entute perdi kontakton kun la realo! Denove, la teknikoj de "haltu!" kaj surbendigoj helpegas en tiaj ĉi kazoj.

Registru sur kasedon pri la dinamiko de via rilato: kio bona estis en ĝi, kiam kaj kial ĝi komencis ŝanĝiĝi, kial ĉio finiĝis kaj kiamaniere la fino estis bona por vi ambaŭ. Kaj, kiam vi sentas, ke la dezirego telefoni invadas vin, ekaŭdu la kasedon. Ĉar la propra voĉo havas tre grandan influon sur oni mem, registraĵoj estas ege helpaj dum ŝokoj. Kiam vi laciĝos aŭdi ĝin faru novan. Tio estu por vi vera cerbolavado.

Estas ankaŭ eble, ke la alia pro respekto kaj estimo montriĝos afabla komence, sed estu honesta kun vi mem kaj analizu vian rilaton fojon plian. Se vi tamen estas plene konvinkita, ke via ekskunulo ankoraŭ sentas iun minimuman intereson pri vi, petu lin rekonsideri ĉion unu aŭ du semajnojn, fine de kio *li* voku vin. Aŭ diru: "Mi lasas al vi la decidon, ĉu bone?" Tiu estas granda paŝo, kiu montras vian kuraĝon. Se nenio aŭdiĝas, via memamo estos savita ĉar vi estos permesinta al li preni sian propran decidon.

Kiam via emocia pesilo perdis sian ekvilibron, estas tre facile provi la *fuĝon tra ekscesoj*. Alkoholo kaj narkotaĵoj povas ŝajni bonaj amikoj komence, sed vi devas konscii, ke eĉ se vi poste sukcesos superi ilin, spuroj ja restos. En tiuj kazoj vi ne devas heziti kontakti Anonimajn Alkoholulojn aŭ similan asocion por narkotuloj.

Alia danĝero kuŝas en troa manĝado. Se vi sentas, ke via apetito kreskas tagon post tago, ankaŭ en tiu ĉi kazo taglibro povas servi. Notu en ĝi ĉion, kion vi manĝos. Aĉeti ekzercobiciklon kaj meti ĝin en la kuirejon ankaŭ estas bonega ideo. Grimpu ĝin kaj pedalu ĝis vi sukcesos vin

Kiel ĉiuj fortaj homaj sentoj, la doloro kaŭzita de amdisiĝo neniam ĉesos lasi sian spuron en arto. Jen du poemoj pri tiu temo.

Sur la tombon

Sur la tombon de nia amo, kiel ĉiudimanĉe, jam de tri jaroj, mi lasis hodiaŭ mian faskon de floroj apud la via.

Li ven Dek

(el *IBERE LIBERE*, Pro Esperanto, 1993)

Al mia krokodilo

Kie buŝologa krokodilo Vi malaperis? Kiom malplena estos la domo sen Via scivolemo kaj Via kobolda balbutado! Kiu datirigos nun la oscedadon pro akuzativo kaj kiu eksplikos al mi ĉiutage denove la malsaĝon de la dek ses reguloj? Neniu krokodilaj larmoj verŝiĝos de nun sur mian verdstelitan bruston kaj neniu havados indulgon kontraŭ mi ĉar mi ja sole en Esperanto hejmas. Buŝologa krokodilo kiu nun en vintronokto frostiĝas kie Vi nur estas? Kie?

Benoît Philippe

(el *GLAŬKA LUM*, Pro Esperanto, 1994)

regi. Aŭ anstataŭigu la manĝaĵojn per aliaj kun malpli da kalorioj.

Kiam vi sentos vin sufiĉe sana por serĉi novan rilaton, zorgu ne postkuri ion similan al via eksa homo. Male, klopodu trovi iun tute malsimilan al la antaŭa. Sed la sekreto estas trovi iun, kiu vere ĝojigu vin. Ne faru *aĉeton pro komparo*.

Kiel vi vidas, vi devas esti via propra kuracisto kaj via propra gardaĝelo. Fakte, la amoŝoko estas oportuna periodo de la vivo por koni sin pli bone, esti pli amikema kaj pardonema al si kaj konscii, ke la vivo estas vere bela kaj indas esti plenĝoje vivata.

Vidu ĉiun kaptilon kiel fendon, kiu malfermiĝos sur via haŭto. Ŝtopante ilin vi plifortigos vian karakteron kaj multe kreskos emocie.

Rezigno: la etapo de l' adiaŭo

La transiro de *kulpigo* al *rezigno* povas esti la plej malfacila el ĉiuj. Oni povas nomi tiun ĉi lastan *etapo de la adiaŭo*, ĉar en tiu ĉi momento vi pretas diri: "Tiu ĉi homo ne plu estas en mia vivo. Nun mi devas decidi, ĉu pasigi la ceteron de la vivo kolere lamentante aŭ iri antaŭen". Vi devas ne nur akcepti tion, sed komplete liberiĝi de ĝi apartiĝante de la alia homo, reprenante la energion, kiun vi investis en la rilato. Jen la dolĉamara momento de la amoŝoko. Vi povas sperti kontraŭajn sentojn: ian ĝojon ĉar vi pretas lasi vian rilaton, kaj doloron ĉar vi forlasas ĝin.

Kvankam la plej malbona parto jam pasis, zorgu ne resti kaptita en tiu ĉi etapo. Eble vi sentos vin lacega kaj sen motivigo. Kiam lastafoje vi feriiĝis? Ĉu vi ne ŝatus, ekzemple, kampadi sola dum semajno? Tio povos helpi doni definitivajn finojn al tiu ĉi etapo!

Uzu kasedon aŭ vian taglibron por analizi, kio fiaskis en la rilato kaj kial ĝi finiĝis, kaj estas io alia, kio aparte povas helpi vin: la ekzerco kun *objektoj de kuneco* (vd kadron en p. 7).

Kial tiel malfacilas diri "adiaŭo"

Komence ni komparis la amoŝokon kun tunelo, kiun vi devas trairi. Malantaŭ vi restis tuta mondo: granda parto de via tempo, kutimoj, lokoj, eble boparencoj. En malhelto, malmulton perceptante, vi trairas iun longan tubon nigran, en kies alia ekstremo brilas denove la lumo. En tiu vojaĝo portu nur tion, kio konsolas vin kaj pliriĉigos vian estonton dum vi paŝas al la *rekonstruo*. Estas malsaĝe kunporti ion, kio haltigos vin ene de la tunelo, kiu baros vian vojon. Kaj ripetu al vi ofte, ke "tiu ĉi rilato finiĝis. X ne plu estas parto de mia vivo. Ju pli baldaŭ mi liberiĝos, des pli feliĉa mi estos".

Rekonstruo

Kiam vi ekrekonstruis vian vivon, la plej terura parto de la ŝoko komencas resti for. Nun vi pasigas pli da gajaj tagoj ol malgajaj. Vi rehavas la koncentriĝopovon kaj klopodas korekti la malbonajn kutimojn akiritajn dum via amoŝoko. Via vivo denove apartenas al vi kaj vi reserĉas vian ekvilibron. Vi pretas ekhavi novan rilaton kaj komencas vere ĝui la vivon kaj doni valoron al ĝi, kio en si mem estas granda atingo. Promeni kun viaj amikoj, ridi, ĝui. Kelkaj je la unua fojo ekatentas pri sia propra bezono kaj bone elektas la homon, kun kiu ili pasigos la tempon, amante sane kaj ekvilibre.

Se vi emos kompari vian novan koramikon kun la antaŭa, memoru, ke eĉ se ekzistas fizike similaj homoj, ĉiu el ni estas ja unika. Aparte atentu do pri liaj apartaj karakterizoj kaj respondu al liaj bezonoj.

Tiu ĉi etapo estas kiel rekomenci marŝi rompinte al si unu kruron. Vi resaniĝis, sed vi ankoraŭ bezonas forton disvolvante memestimon kaj fidon je vi mem. Probable vi eraretos denove, ekzemple fulme rilatos al homoj, kiujn poste vi rezignos. Permesu tion al vi. Forgesu vian bezonon esti perfekta! Per niaj eraroj ni lernas kaj maturiĝas.

Dum vi konscias pri la tuta spertita doloro, vi ekkomprenos, kiom vi gajnis kaj perdis pro la rompo. Multaj trovas, ke ili pli gajnis ol perdis. Aliaj havas la eblon krei pli feliĉan kaj riĉan vivon.

Solvo

Jen la komenco de nova vivociklo. Vi estas ekster la konflikto kaj la damaĝoj, kiuj akompanis vin ekde la komenco de la amoŝoko. Certasence vi repaciĝis kun via emocia sufero. Via vivo reorientiĝas, sed laŭ nova direkto pro via persona disvolviĝo spertita tra la tuta "vojaĝo" tra la amoŝoko. Eble estas nun, ke vi povas decidi pri iniciato de nova amrilato. Sed se ne, ĉiuokaze vi havos pli da fido en via kapablo krei propran feliĉon kaj zorgi pri vi mem.

Turnu vin al la teknikoj por konservi vian memregon, kiam vi sentos memdetruajn sentojn. Vi povas surbendigi viajn sentojn, havi taglibron, fari liston de viaj aktivajoj dum la tago kaj kion vi sentas farante ilin. Aŭ dialogi kun vi mem du fojojn tage por 10 minutoj. Diru, kion vi faras, kiel vi fartas, kiel vi konsideras, ke vi agas. Kaj estu honesta! Sed atentu: se vi pasigas pli ol du semajnojn en sinteno memdetrua, vi devas urĝe serĉi profesion helpon, kuraciston, familian konsiliston aŭ terapiston!

Kaj ne forgesu la necesajn distraĵojn. Ili estas taŭgaj por mildigi la ŝokon kaj ja povas reprezenti gratifon por via peno: eble fine de la amoŝoko vi ne nur trovos, ke vi sukcese trairis unu el la pintaj krizoj de la vivo, sed disvolvis iun novan talenton aŭ kapablon. Eble nun vi estas bonega sportisto aŭ promesplena ceramikisto. Aŭ eble vi havas pli belan korpon aŭ pli bonan postenon.

Ankaŭ la malstreĉiĝoteknikojn ne forgesu. Kaj ne ĉesu diri: "Mia ŝoko estas finita", "Ĉiun tagon mi estas pli kaj pli forta", "Mi scias regi min". Legu viajn slipoj "Haltu", "Ne voku!" kaj ripetu ilin dum vi rigardas vian propran bildon en la spegulo memorante, kiom multe vi progresis.

La plej suferigaj mometoj estas for kaj vi aktive rekonstruas vian vivon. Rideto revenis al via vizaĝo kaj vi eĉ komencas ĝui esti libera denove. Zorgu tamen ne enplektiĝi en novan rilaton kun iu, kiu tre similas al via eksparulo.



Ljiljana kaj Fernando

La sekvaj estas veraj kazoj Ambaŭ, Ljiljana kaj Fernando sian vivon, hodiaŭ estas p denove povas ami.

Tie ĉi, en mia nova lando kaj kun tute alia vivo ŝajnas tiel foraj tiuj tagoj... Sed mi tamen memoras, ke estis malfacile akcepti la ideon pri disiĝo; en la unua momento ĝi ŝajnis nura kaprico.

Dolorigaj kaj ankoraŭ necertaj sentoj, ĉiam pli kaj pli longedaŭraj priprenoj turniĝantaj ĉirkaŭ mi. "Ĉu mi postulas tro? Ĉu mi eraras atendante pli?", tiaj pensoj obsedis min. Ekstis deprimado pro neeblo liberiĝi de ili. Sed mia koramiko estis tro okupita tro da tempo jam pri sia prosperanta negoco, sen tempo por mi.

Li antaŭsentis ion. Dum interparoleto (mankis tempo al ili) ni interkonsentis pri portempa disiĝo. Amikino, hazarde psikiatro, per fakaj konsiloj provis helpi. Sekvis penoplenaj klarigoj al ŝi (kaj al mi mem), ke oni ja rajtas foriri ĉar oni sentas, ke la amo ne plu estas tia, kiel mi ŝatus. La superadon de la ŝoko mi entreprenis intence, tute konscie, kiel obeema lemantino. Mi sekvis dietajn konsilojn: multe da vitaminoj kaj iom da ĉokolado iel helpas mildigi la senton pri soleco. Kaj tio vere helpis! Estis ankaŭ longaj promenadoj por "elmarŝi el la ĉagreno". Poste aliaj homoj, aliaj aferoj ekhavis lokon, fariĝis prioritataj en mia vivo. Kaj la milito komenciĝis.

Pri multaj geamikoj mi ne plu sciis. Eksterlandaj samideanoj ekhelpis min kaj post kvin monatoj mi sukcesis forfuĝi. En la ĉefurbo, atendante vizon por daŭrigi mian vojaĝon eksterlanden, mi renkontis mian eks-koramikon! Mia tuja kaj nura penso estis: "Li vivas, dank' al la ĉielo!"

Ljiljana, Kroatio/Kanado

du kazoj de amoŝoko

de amoŝoko.

do, sukcesis rekonstrui
i maturaj, sekuraj kaj



Mi estis lasinta mian familion, fakultaton, laboron, geomikojn, ĉion. Mi estis nur 17-jara kaj blinde amis Rikardon.

En mia pensionaĉo mi spertis eĉ malvarmon, sed ĉio tamen estis bona al mi, ĉar mi estis proksima al ili! Tamen, baldaŭ venis la unua elreviĝo: post jaro li diplomigis kiel... katolika pastro! Tio estis batego. Sed mi plu amis lin.

Por li mi tamen ne estis grava. Dum tiu monato, kiun mi pasigis en San-Paŭlo, ni restis kune nur en kvar tagoj. Tie, 1 400 km for de mia familio, li donis nenion de si, ne plenumis siajn promesojn; finfine li kriis: "Vi ne havas lokon tie ĉi. Reiru al via urbo!"

Mi devis reveni al mia pasinta vivo, sola, malplena. Mi iĝis tre malĝoja, ne volis vidi iun ajn, nur ploradis ĉiam. Mi miallaboris, ekvegetis. Mia koro iĝis kiel ŝtono aŭ truo, vere, mi ne plu sentis ĝin. La vivo ne estis bona aŭ bela. Mia unua amo estis mia unua plej granda elreviĝo. Por superi mian amoŝokon mi bezonis 9 monatojn, sed forgesi mi ne sukcesis ĝis nun.

En junio ĉijara, 1994, mi iĝis 20-jara kaj intertempe kreskis, viriĝis, ne plu estas infano. La vivo ne estas kiel antaŭe. Komence mi ne povis vidi la amon kun la pureco de antaŭe. Mi ankoraŭ sentas ian malkuraĝon ami, tial mi ne donas min tute al alia amo, kvankam foje mi timas, ke pro tio mi povas perdi mian nunan amaton. Mi restis kun traŭmato. Sed denove okazis: mi enamiĝis (al mia E-instruisto... kaj li al mi!)

Rikardo restas bona amiko kaj ofte, konsilanto, ankaŭ pri amo. Sed la amo, ege forta, estas ĉe mia kate bela kaj inteligenta Ŝiko!
Fernando, Brazilo

Lernante de via propra historio

Farante vian personan deklaron konservu la pozitivajn aspektojn de via rilato (filojn, karieron, amorkapablon ktp). Jen la veraj amheredaĵoj.

Serioza amoŝoko estas unu el la plej malfacilaj testoj, kiujn ni devas trapasi en la vivo. Superi ĝin signifas esti lerninta, spertiĝinta, kreskinta. Post ĝi vi konos vin pli bone kaj povos konstrui pli solidajn vivon kaj amrilaton.

Kaj en via venonta rilato konservu vian identecon: karieron, amikojn, interesojn. Estas malsaĝe doni vian tutan vivon al alia homo. Ne lasu vin esti absorbita de la alia!

Estas en ordo lerni de siaj propraj eraroj kaj ke foje la aliaj ridu pri vi. Estas tempo por integriĝi al viaj kolegoj, ĉar nun vi ne devas kuri hejmen por esti kun via parulo. Sportu, ludu, aliĝu al asocio bestoprotekta, aŭ iĝu vegetarano, kion vi neniam povis fari, ĉar li ne kunlaboris. Eniru "en la ĉefluon" kaj permesu al vi plezurojn: masaĝojn, friziston pli ofte, saŭnumadon, belajn vestaĵojn. Ĉio tio plifortigos vian memestimon.

Kiel scii, kiam vi estas preta ami denove?

Lun tagon, bone ripozinte, vi vekigiĝas gaja, pretigos vian matenmanĝon kaj sentos vin feliĉa. Birdoj pepos ekstere kaj vi aŭdos la gajan radioparoliston saluti la sunon. Vi pensos pri via studo, laboro aŭ novaj konatoj kun ĝojo. Tiam vi estos preta ami denove. Memoru, ke estas normale dum la eliro el la amoŝoko havi etajn timojn iniciati novajn rilatojn.

Eble vi ne tuj enamiĝos denove, plej probable ne. Sed ne subtaksu la fulmajn rilatojn. Ili ja povas multe utili dum la rekonstruado, kiun vi entreprenas. Ili helpos vin reintegiĝi al la vivo, sentigos vin ŝatata, dezirata, kio estas bona por via memestimo. Ne gravas, se ili ne daŭras longe: se vi ambaŭ estas maturaj, vi povas resti bonaj amikoj. Vi havas neniam por perdi, nur ĉiom por gajni, ĉar ne ekzistas promesoj, postuloj aŭ ligoj. Jen unika ŝanco esti honesta.

Estas nature, ke post amoŝoko viroj sentu sin impotentaj kaj virinoj fuĝu de l' seksumado. Sed ĉiam memoru, ke neniu estas devigata seksumi, se li ne vere deziras tion. Cetere, oni ne devas tiom rapidi al sekskuniĝo! Foje ĝia tuta preludo, kiu povas daŭri kiom ajn vi kaj via nova amiko volas, estas multe pli ĝuodona! Komence longaj konversacioj kaj promenoj, poste manprenoj, pli malfrue karesoj. Pli poste kisoj kaj ĉirkaŭbrakoj, pli kaj pli longedaŭraj... Ne rapide. Se viaj unuaj rilatoj fiaskas, ne timu: vi estas relernanta.

Denove ami

Amoŝoko estas unu el la plej grandaj lecionoj de la vivo, kaj superi ĝin estas kiel sukcesi ĉe plej granda ekzameno. Vi ne nur estos lerninta pri vi kaj la vivo, sed sentos grandan ĝojon kaj akiros grandan sperton por povi rekonstrui

rilaton, ĉi-foje multe pli saĝe kaj mature. Via nova elekto sendube estos multe pli prudenta kaj bona. Kaj vi komprenos, ke por teni aman rilaton estas necese ne nur ami.

Fakte, vi devas serĉi amaton kun komuna vivfilozofio. Tio ne celas, ke ĉio devas esti komuna al vi ambaŭ, sed la bazo ja devas esti. Se ne estas tiel, vi povas eĉ edziĝi, sed kiam la pasio foriros, la kontrasto inter la malsimilaj vivfilozofioj iĝos pli evidenta. Brazilaj esperantistoj ofte diras, ke la 17-a regulo de la Fundamento estas: "La edzino ne parolas Esperanton" – kio aplikeblas ankaŭ al edzoj, kompreneble. Nun imagu homon, kies ĉefa hobia aŭ eĉ pasio estas Esperanto, kiu trovas parulon, kiu ne nur malaprobas ĝin sed eĉ ofte malpermesas partopreni la klubkunvenojn ktp. Ama rilato devas esti konstruita sur kompreno kaj komuna vivfilozofio, ne sur obsedo kaj egoismo. La vivo estas tro mallonga por rezigni, kion vi plej ŝatas! Kompreneble, komuna vivfilozofio ne garantias la feliĉon, sed estas bona komenco!

Kaj estu gaja! Ne restu bedaŭranta poreterne tiun rilaton, kiu ne plu ekzistas. Permesu, ke oni amu vin. Estas tre malfacile ami amarulon. Albert Schweitzer asertis, ke la tragedio de la vivo kuŝas en tio, kio mortas ene de homo, dum li ankoraŭ vivas. Se oni demandas vin pri via antaŭa rilato, ne respondu negative – vi povas esti miskomprenata! Se vi vere trovas nenion pozitivan diru, ke vi preferas ne paroli pri tio. Profitu de via kolero. Analizu ĝin: se estas, ekemple, la perfidemo de via amito, kio kolerigas vin, neniel serĉu novan homon kun simila "virto"!

Memoru, ke ne eblas kuniĝi al promeso. Kio li estas en tiu ĉi momento estas la sola pruvo, kion vi havas. Ne enamiĝu al promeso.

Multaj psikologoj identigas baze tri specojn de amrilatoj, nome la *parazitan*, en kiu unu "suĉas" de la alia sen reciproke, la *simbiozan*, en kiu unu ne povas vivi sen la alia, ĝis unu el ili plene obsediĝas, kaj la *kunlaboran*, en kiu ambaŭ maturiĝas kune pli tra la rilato ol solaj. Tiu ĉi lasta estas la ideala. Kiam unu estas for de la alia, ili tamen fortas, ĉar unu kontentas pri la alia. Ilia sekreto kuŝas en tio, ke neniu endanĝerigas la ecojn sur kiuj baziĝas ilia rilato.

Amo ne necese devas esti la prioritato de via vivo. Ekzistas multaj feliĉaj paroj, ĉe kiuj estas la profesio, ekzemple, la plej prioritata afero. Sed por ke tio funkcii ambaŭ devas senti sin emocie komfortaj kun tiu komuna interkonsento. La tempo pasigita ĉe la laboro, ekzemple, povas esti kompensita per pli intensaj kaj ekscitaj momentoj. Ankaŭ tie ĉi pli valoras kvalito ol kvanto.

"Post vetero malbela lumas suno plej hela." Memoru tion. Ĝenerale la superintoj de amoŝoko sukcesas esti pli feliĉaj kaj konstrui pli solidajn kaj longedaŭrajn rilatojn poste.

Kvankam tio prenis plurajn jarojn, reĝino Viktoria trovis kuraĝon por superi la amoŝokon: ŝi decidis reveni al la Palaco de Buckingham post sia memekzilo. Finfine, jam trankvila, ŝi povis alfronti la murojn de l' palaco. Tiuj muroj, kiuj en alia tempo gastigis la amon de Alberto kaj ŝi. Ŝi denove prezidis la Parlamenton kaj ne nur efike regis, sed eĉ kondukis la britan imperion al ties apogeo.

Indas eliri el la tunelo. La vivo, kiu atendas vin ĉe ĝia fino, estas pli vivinda. Serĉu ĝin. □

La angulo

de Ludmila kaj Petro

skribu vorte iun ajn nombron.

Nombro ĝiajn literojn kaj skribu vorte tiun nombron. Nun nombro la literojn de tiu ĉi nova vorto, skribu la novan nombron, ktp. Se vi faros tion ekz. en la angla, vi rapide ekhavos nur 4. Jen du ekzemploj:

The cube root of pi ($\sqrt[3]{\pi}$) › fifteen (15) › seven (7) › five (5) › four (4) › four (4) › four (4)...

The logarithm of ten to the base two ($\log_2 10$) › twenty-nine (29) › ten (10) › three (3) › five (5) › four (4) › four (4) › four (4)...

Kiel estas en via denaska lingvo, kaj en Esperanto? Kaj... ĉu vi jam scias, kial tio okazas? (Respondojn trovu ĉi-sube kap-al-tere.)

ni ĉiuj bone scias el lernejo,

kio estas naturaj (N) nombroj kaj entjeroj (E):

$N = \{1, 2, 3, 4, \dots\}$ *

$E = \{\dots, -3, -2, -1, 0, 1, 2, 3, \dots\}$

Kiuj el ili estas pli multaj laŭ vi?

Nu, ili estas egale multaj!

Ni facile konvinkiĝos pri tio, se ni rimarkos, ke al ĉiu natura nombro respondas unu entjero.

Oni povas fari tion jene:

N:	1	2	3	4	5	6	7	8	9	...
	↑	↑	↑	↑	↑	↑	↑	↑	↑	
E:	0	-1	1	-2	2	-3	3	-4	4	...

*Foje en la naturaj nombroj oni inkludas ankaŭ nulon.

respondoj

Oni povas antaŭvidi la finon de la sinsekvo en kiu ajn lingvo. Por tio surtacas scii, kiel oni skribas ĉiujn ciferojn en la koncerna lingvo kaj trovi la ciferojn (eventuale nombrojn), kies nombro da literoj egalas ilian valoron. Guste tiuj ĉi ciferoj (nombroj) ĉiam finas la sinsekvon. En Esperanto ili estas jenaj:

du (2 literoj) = 2 (valoro)
tri (3 literoj) = 3 (valoro)
kvar (4 literoj) = 4 (valoro).
Ĉiuj aliaj nombroj kaj ciferoj diferencas. Ekzemple:

unu (3 literoj)
kvin (4 literoj) ktp.

Kiam en iu lingvo ne ekzistas ciferoj, kies nombro da literoj egalas ilian valoron, tiam ĉe la fino de la sinsekvo oni ne ricevos unu ciferon, sed sinsekvon de ciferoj periode ripetigantaj (tiel estas en la pola lingvo, ekzemple.)

Ankaŭ vi povas kontribui!

Fondaĵo Ameriko



helpas al la Esperanto-movado en Centra kaj Suda Ameriko. Vian donacon vi povas sendi pere de la kotizperanto en via lando aŭ rekte al UEA. Dankon!

facila

Krucvorto

Claus Günkel, Germanio

Sendu vian solvon al nia redakcio antaŭ la 5a de nov. 1994. Inter la partoprenantoj ni lotumos libro-premion.

1		2		3		4		5
	●		●		●		●	
6	7		●		●	8	9	
10		●				●	12	
13		14	●		●	15		
	●		●		●		●	
16								

HORIZONTALE

- Granda konstruaĵo en urboj
- Tiu ĉi, aŭ tiu, aŭ tiu alia; ne gravas
- Membro
- Trinkaĵo el sekigitaj folioj (s.f.)
- Korpoparto por puŝi la sangon (s.f.)
- Parteto de io
- Korpoparto, kiu kun aliaj tenas la korpon (s.f.)
- Apartenas al ĝi
- Fratineto de la patrino aŭ patro

VERTIKALE

- Ujo
- Virina antaŭnomo (s.f.)
- Sciigi, doni novaĵon al iu
- El plej multekosta metala
- Malagrabla por la nazo
- Ne ne
- Maljesi
- Objekto por kovri, vesti, visi aŭ sekigi (s.f.)
- Kunplezure, kunestime, kunĝoje

Ĉu vi kapablas krei facillingvajn (laŭ la KONTAKTO-vortolisto) krucvortojn simetriajn, kiel tiu ĉi? Se jes, sendu ilin al nia redakcio por publikigo! Koran antaŭdankon!

Alphonse Daudet:

Tre mirigaj aventuroj de TARTARIN DE TARASKONO

La Libroservo de UEA ankoraŭ havas kvanton de tiu ĉi humura majstroverko!

192 paĝoj, tole bindita, ilustrita. Prezo: 18 gld., triona rabato ekde 3 ekz.



Jaan Ojalo:

esperantaj sinonimoj



La plej kompleta de sia speco; bazita sur Plena Ilustrita Vortaro. La unua parto donas sinonimojn por ĉ. 2 000 vortoj. La dua parto estas indekso, kiu ebligas trovi sinonimojn por 5 500 vortoj. Tre utila por pliriĝigi la vortotrezoron kaj freŝigi la stilon.

Dua korektita eldono, 1993. 96p. Prezo: 15 guldenoj. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Christine gajnis PIV!

Christine Lemercier el Francio estas la feliĉulino, kiu gajnis Plenan Ilustritan Vortaron en la lotumado de la 50-a Internacia Junulara Kongreso en Ch'onan, Koreio. Gratulon al ŝi!

En la lotumado partoprenis ĉiuj individuaj membroj kaj patronoj de TEJO kaj aliaj ĉi-jaraj abonantoj de *KONTAKTO*.

Ankaŭ kvin pliaj bonŝanculoj ricevos libropremion. Ili estas José Ricardo Toscano el Portugalio, Doru Neagu el Rumanio, Marcelo A. Borges Varanda kaj Eduardo Alves Fonte el Brazilo, kaj Michel Cavelan el Francio. Gratulon!



Christine estas parizano, kiu tre ŝatas vojaĝi. Antaŭ tri jaroj ŝi ekz. trairis Argentinon, de La Quiaca [la kiaka], plej norda punkto, ĝis Fajrolando. Ĉi-jare ŝi laboris por franca eksport-kompanio en Bankoko kaj Honkongo, kie ŝi renkontis esperantistojn, sed en la IJK ŝi ne povis partopreni. Tie ĉi vi vidas ŝin ĉe la maro – velboatado estas ŝia hobia. Ĉu ŝi eble kunportos sian PIV dum unu el tiuj sportaj aventuroj?

Ame kaj klere verkita klasikaĵo:

Vivo de Zamenhof

(1920)

de Edmond Privat

134 p. 18 cm.

Bind. 18,90 gld.

Triona rabato ekde tri ekz.

REZULTOJ

Ni ĝojegas anonci, ke la gajnintoj de nia Futbala Mondpokala konkurso de *KONTAKTO* 140 (1992:2) estas **Mirta D. de Kobše** el Argentino, **Meziane Boukhebou** el Alĝerio, **Kikulu Bertin** el Burundio, **Fabrizio Pagliaroli** el Italio kaj **Razen Manandhar** el Nepalo. Gratulon al ili!

Ĉi tiu kvizo estis aparte sukcesa pro du kialoj: Unue, ni ricevis entute 30 respondojn el 14 landoj (Alĝerio, Argentino, Benino, Brazilo, Burundio, Ĉinio, Irano, Italio, Kenjo, Madagaskaro, Nepalo, Senegalio, Tanzanio kaj Togolando), do jen la plej ŝatata kvizo de *KONTAKTO* ĝis nun. Due, plejparto el la partoprenanto (pli ol 80%) respondis ĝuste al la 5 demandoj, kies respondoj estas: 1. Italio, 2. Urugvajo, 3. Brazilo, Germanio kaj Italio, 4. Francio, kaj 5. Brazilo.

Premio por la gajnintoj jam survojas. Ĝis revido en Francio 1998!

Joĉjo Truong, nome de USEJ

Fumo por ĉiuj

(Aŭ Kial rusaj gejunuloj povas ne ĝisvivi la maljunecon?)

Ne, mi ne estas tia pesimisto, sed... Imagu, ke ĉiuhore radio, televido, gazetoj diras, preskaŭ krias: "Aĉetu, fumu, drinku...!" Multe da novaj cigaredoj kaj drinkaĵoj oni povas vidi kaj aĉeti ĉie. Tia senlimo ekestas en la post-perestrojka (ĉu vi ankoraŭ memoras tiun vorton?) Rusio. Ju pli malofte fumas okcidenteŭropanoj kaj usonanoj, des pli ofte oni fumas tie ĉi.

Se antaŭe 12-jara knabo aŭ knabino estis tuj forpuŝata de vendotablo, kie oni vendas cigaredojn kaj drinkaĵojn, nun (mi scias laŭ informoj de la polico) ĉiu infano havas la eblon, se ekzistas deziro kaj mono, aĉeti kion ajn ŝi-li volas.



Mi havas aĉan statistikon. En rusaj lernejoj (moskva regiono) preskaŭ 70% el la gejunuloj fumas kaj pli ol 80% el ili drinkas. Preskaŭ 30% el la fumantetoj komencis fumi nur 6- aŭ 7-jaraj.

Ĉu tia situacio mirigas vin? Ĉu vi povus elteni vidi ĉiu-minute multe da reklamoj pri "belaĵ" narkotaĵoj kaj ne tentiĝi gustumi "bongustan" cigaredon aŭ faman vodkon "Smirnoff"? Gejunuloj ja havas tre maldikan psikologian memdefendemon.

Mi ne estas fumanto, sed preskaŭ ĉiuj homoj ĉirkaŭ mi fumegas. Do jen, ankaŭ mi iĝas (pasiva) fumanto.

Oni demandas, "kion fari?" Nuntempe ekzistas nur unu respondo — nenion. Kial? Mi ne scias. Mi devus reveni al la nomo de tiu ĉi artikolo. Ĉu trovos ni eliron el tiu ĉi multfuma labirinto?

Irina Alekseeva, Rusio

tre
facila

L TAMARA ĉiam plaĉis viroj el malproksimo. Kial? Ŝi mem ne povus diri. Sed la kunstudantojn el sia Eŭropo ŝi neniam trovis interesaj, dum tiuj kun ĉina, afrika, indiana deveno enportis ŝin en amon. La junulo, kiu ĉi-foje eniris la trinkejon, aperis hinda. Nur unu rigardo sufiĉis, kaj ŝi jam ne plu estis si mem, ŝi ne plu estris sin. Ŝi trovis lin pli bela ol iu ajn viro ĝis tiam renkontita. La sentoj, kiujn li estigis, estis dismovigaj kaj malklaraj, ŝi ilin ne komprenis, sed ili ege fortis. Kio ĝuste okazas, ŝi ne sciis, ne povus diri. Io, kio ne estis ŝi estris ŝin. Ne gravis, kio. Eble lia beleco. Gravis nur, ke li aperas tiel aminda. Ŝi ne povis ne ami lin. Novafoje Tamara unuarigarde enamigis, novafoje ŝin plenigis la ĉielen-leviĝo, kiu samtempe igis ŝin feliĉega, kaj malfeliĉa. Verdire, eĉ per la malfeliĉeco ŝi plezuris. Pri Tamara neniam estis certe, ĉu ŝi vivas la vivon, aŭ sentoriĉan rakonton, kiun ŝi senvorte rakontas al si.

La trinkejo estis plenplena. Ĉu la ampreteco de Tamara movis lin, aŭ ĉu li elektis tiun lokon senpripense, nur ĉar li ja deziris ie sidi, ni ne povas scii, sed ĝuste al ŝia tablo li direktis sin.

“Ĉu vi permesas, ke mi sidu ĉi tie?”

Al Tamara estis tre malfacile ne respondi: “Mi rekomendas, ke vi sidu ĉe mi. Mi petegas vin ĉi tie eksidi. Mi plej forte deziras, ke kun mi vi sidu...” Ŝia tuta estaĵo volis diri tiajn vortojn. Sed ŝi sukcesis ilin ne eligi. Metante en siajn rigardon kaj parolojn kiel eble plej multe da ina amindeco ŝi respondis: “Jes, mi permesas. Se vi bonvolos diri vian nomon.”

“Mi nomiĝas Raŝid,” li diris, kaj tiuj simplaj vortoj sonis tiel bele, lia rigardo aperis tiel amo-dona, ke refoje ŝi perdiĝis en maron da neestreblaj sentoj, plezurige malklaraj. ‘Mi falas en la ĉielon’, ŝi diris al si, senzorge pri tio, ĉu tiuj ideoj povas aŭ ne samtempe kunesti. Ŝi ja ne troviĝis en mondo de pensado, sed de sentoj, kaj sentoj povas samminute iri supren kaj malsupren, eĉ se la plimulto el la viroj tion ne komprenas.

Li venis el Kenjo, kie liaj gepatroj havis ege sukcesan komercon. Riĉegaj ili estis. Granda parto de la komerco, en Orienta Afriko, estas en la manoj de homoj kun hinda aŭ pakistana deveno. La gepatroj de Raŝid jam ricevis tiun mirinde funkciantan komercon de siaj gepatroj, ankaŭ kiuj ricevis ĝin de la propraj gepatroj. Jam jardekojn mono multiĝis en tiu familio.

Kiam li diris, ke li volis edziĝi al ŝi, ŝi ne povis diri “ne”. Ne pro lia riĉeco, nur pro li, pro lia tuta personeco. Tamen, se diri la veron, la ideo edziniĝi en riĉegan familion enhavis nenion malplaĉan.


Tuj post kiam la kursoj finiĝis, li sciigis al ŝi, ke li reiros hejmen por la libertempo.

“Kial ni ne geedziĝus antaŭe? Tiel mi irus kun vi,” ŝi diris.

“Ne eblas, mia familio ne konsentus. Mi devas prepari ilin. Nia vivo estas iom malsimpla pri tiaj aferoj.”

“Se vi alvenus kun mi, vi povus prezenti min.”

“Ke ni vojaĝu kune, tio estus neakceptebla por ili; geedziĝo devas esti organizita de la familioj. Se ili ekscius, ke ni kunkuŝis, kaj vi ne plu estas ‘pura’ en ilia pensmaniero, ni devus por-ĉiame apartiĝi. Ne, mi unue iru kaj rakontu pri vi. Necesas prepari la kampon.”



Kiom da fojoj ŝi telefonis al Kenjo, ŝi ne povus diri, sed ili ŝajnis al ŝi nekalkuleble multaj. Neniam ŝi sukcesis paroli al li. “Li estas for”, estis la ĉiama respondo. Se ŝi petis klarigon, aŭ demandis, kiam aŭ kie trovi lin, la alparolato uzis ian nekomprenoblan formon de la angla, kiu lasis ŝin senvorta. Tamen ŝi foje ricevis poŝtkarton de li el Dar-es-Salamo, en Tanzanio. “Mi pensas pri vi,” ĝi diris, senplue.

Iun tagon ŝi ekvidis lian amikon Simhan. “Kio okazis al Raŝid? Ĉu vi scias? Kiam... kie... kial...?” Ŝi ĵetis al li ĉiujn demandojn samtempe kun tiel forta sci-deziro, ke li sentis sin pli malpli kiel homo frapata ĝis-fale. Li ne sciis, de kie komenci.

Ĉu Tamara edziniĝos?

Claude Piron, Svislando

“Mi alvenis hieraŭ,” li diris, kio tute ne interesis ŝin. “Bonvolu iom malpli rapide paroli. La vojaĝo estis longa, mi ne povas pensi klare.”

“Sed mi devas scii, mi bezonas scii, se mi ne scios pri Raŝid, mi mortos! Ni ja devas geedziĝi.”

“Jes, mi scias. Sed estas bone, ke vi ne edziniĝis jam.”

“Kial?”

“Vi malfeliĉus.”

“Pro kio?”

“Ĉar Raŝid... Mi ne dirus, ke li vin ne amas, sed verŝajne li amas sian riĉon pli ol vin.”

“Kial vi tion diras?”

“Aŭskultu. Se li amus vin, li estus nun kun vi ĉi tie.

Sed kiam li provis paroli pri vi sia hejme, liaj gepatroj tuj interrompis lin. ‘Vi edziĝos al knabino el nia popolo’, ili diris. ‘Ni ne konsentas pri io alia’. – ‘Mi ne zorgas pri via konsento’, li respondis.

‘Mi reiros Eŭropon, kaj edziĝos.



Ŝanĝas nenion, ke vi ne akceptas'. – 'Ĉu vere?' la patro diris, 'ĉu vere ŝanĝas nenion? Reiru do tien kaj prenu ŝin kiel edzinon, se vi deziras, sed tiam vi ne plu estos nia filo. Kaj al ne-filoj ni ne lasos la komercon, kun la multa mono, kiun ĝi ĉiutage alportas'."

"Ĉu vi diras al mi, ke Raŝid tion akceptis? Ke li ne trovis la forton diri 'ne'? Kaj li ne respondis: 'Mi laboros, ŝi laboros, ni iel elturniĝos, sed ni vivos kune'? Se ne tion, kion do li respondis?"

"Li diris: 'Mi bezonas pripensi', kaj forflugis al Dar-es-Salamo."

"Kaj kio okazis tie?"

"Tie? Nenio. Li restis kelkajn tagojn, kaj poste revenis hejmen. Li diris al sia patro: 'Pardonu min, patro, mi decidis plu esti via filo. Kion vi diris, tio certe estas ĝusta. Edziĝi al iu ali-kultura ne sukcesus'."

Tamara senkoloriĝis. Ŝi ne dankis Simhan, ne diris: ĝis revido. Ŝi senvorte turnis sin kaj iris for.

Unu monaton poste ŝi sidis en la trinkejo, kiu tiom plaĉis ĉar en ĝin venadis multaj junuloj studentaj en la universitato. Ŝi sentis sin malfeliĉa. Kaj samtempe akceptis la opinion de Simha, ke se Raŝid estas tia ulo, kia li montriĝis, ŝi certe malfeliĉus kun li. Ŝi provis forjeti lin el sia pensado, sed ne sukcesis.

Kaj jen la pordo malfermiĝis. Envenis alta knabo, afrikano, sed ne tute simila al la plimulto el la afrikanoj. Ĉu eble etiopia? Aŭ iu el la Kariba maro, kun samtempe afrika kaj azia, eble eĉ indiana deveno? Kiel bela li estis! Kiel forta! Ene de Tamara ĉio moviĝis neestreble.

Kiel plej ofte, la trinkejo estis homplena, sed tamen jen kaj jen seĝoj haveblis. Ĉu ŝi faris moveton de la mano, signifan pri venigo? Aŭ ĉu rigarde ŝi montriĝis invita? Fakto estas, ke li proksimiĝis al ŝi.

"Ĉu ĉi tiu sidloko estas libera?" li demandis.

"Jes kaj ne", si respondis.

"Kion vi celas? Ĉu vi atendas iun?"

"Ho jes!", ŝi diris, kaj ŝi disradiis amon sone kaj rigarde. "Ho jes, mi atendas iun, sed vi tamen povos sidi ĉe mi, se vi diros vian nomon."

"Mi nomigas Ĝo," li diris, ne tre certa pri tio, kion ŝi celas. "Kiun vi do atendas, ĉu amikinson same belan kiel vi, aŭ malbelan grand-aĝulinon, pri kiu vi okupiĝas publik-serve?"

Ŝia respondo lasis lin dum minuto senvorta.

"Vin, Ĝo," ŝi diris. "Mi atendis vin."



Tataro Tendo

Eltatarigis Sabira Ståhlberg, Germanio

Tataroj estas popolo nuntempe tre disvastiĝinta tra la mondo. Ekzistas kelkaj popoloj, kiuj estas nomataj tataroj, el kiuj plej famaj estis la tataroj de la Ora Hordo, tre terurintaj Eŭropon siatempe*, sed per "tataro" kutime oni celas homon, kiu venas el la regiono ĉirkaŭ Kazano (en nuntempa Tatario) aŭ la regiono de Volgo (Rusio; ankaŭ eksa teritorio de la Ora Hordo), aŭ homon, kiu havas siajn radikojn ĉe la popolo, kiu nomas sin tataro. Tiu popolo havas tre apartajn kulturon kaj lingvon disde la aliaj popoloj loĝantaj en tiu mikspotejo. Entute pli ol 7 milionoj da homoj parolas la tataran, el kiuj ĉirkaŭ 6 milionoj loĝas en nuntempa KŜŜ, kaj la resto ekster ĝiaj limoj, i.a. en Finnlando, Pollando, Rumanio...

La tataroj estas islamanoj, kaj pro tio multaj rakontoj temas pri islamo kaj la ĉefaj celoj de mokoĵ estas la islamaj aŭtoritatoj. En la tataro mondo ja la mulaoj, muezinoj kaj sufioj abundis, kaj multaj havis pli da potenco ol da inteligento (kiel okazas ankaŭ en aliaj partoj de la mondo, cetero). Popola humuro do floris, tra aparta humuro tataro, kun bazo kaj radikoj en la mezazia nomada kulturo. Per jena rakonto komenciĝas serio da popolaj – kaj popularaj – rakontoj tradukitaj el la tataro.

*La Ora Hordo estis la okcidenta parto de la postmongola imperio (fondita en la 13-a jarcento, daŭranta ĝis la 16-a), regata de la mongoloj, sed la tataroj estis la plej timata antaŭtrupo de la mongoloj, la plej kruelaj kaj plej kuraĝaj inter la nomadoj. Kiam la mongoloj revenis al sia hejmloko, la tataroj restis, miksiĝis kun la jam surloke loĝantaj popoloj, kaj longe regis i.a. la rusojn, iĝis islamanoj kaj malnomadaj, kaj fifamiĝis en Eŭropo, ĝis ili fine perdis potencon.

Mortonta riĉulo

facila

Iam riĉulo maljuna tre mal-sanis, tiel ke lia familio certis, ke li baldaŭ mortos. Li nur kuŝis en sia lito kaj nenion volis manĝi, kaj nur pensis kaj parolis pri sia estonta morto.

Kiam li fine aspektis tre mortonta, kun fermitaj okuloj, la familio kolektiĝis ĉirkaŭ lian liton, por ekscii, kion li lasos al kiu familiano, kaj por ke li povu konfesi sian kredon, kiel bonaj islamanoj kutimas fari antaŭ ol morti.

La familianoj diris:

– Ho, vi certe baldaŭ mortos, kara nia, ĉar via stato estas tiom malbona! Do vi tuj diru al nia viajn ordonojn, kaj tuj konfesu vian kredon!

– La riĉulo tiam malfermis la okulojn kaj diris:

– Hej, ne miksu morton kun kredo! Mi ĉiukaze mortos, tute sendepende de la kredo!

Ami kinon:

La ruĝa sciuro

Originala titolo: *La ardilla roja*

(Hispanio, 1993)

(Kolora, 01h50)

Reĝisoro: Julio Medem

Ĉefroluloj: Emma Suárez,

Nancho Novo, María Barranco,

Karra Elejalde, Carmelo Gómez

Julio Medem apartenas al nova generacio de iberiaj kinistoj. Lia unua plenlonga filmo, *Bovinoj* (Vacas), gajnis amason da internaciaj premioj, i.a. la plej



gravan por filmo kun ekologia fono en Tokio pasintjare. Nun venas *La ruĝa sciuro*, lia dua longa verko.

La ruĝa sciuro grandioze malfermiĝas kun Ĥota, eksmembro de sukcesa muzikbando nun disiĝinta, kiu klopodas suiciidi jetante sin de ponto al timiga rifo. Kiel anĝelo el la ĉielo, neatendite falas ĉe ĝi motorciklisto, kiun Ĥota kuras helpi. Montriĝas, ke temas pri knabino, kiu pro la forta ŝoko poste restas en plena amnezio. Ĥota projekcias en ŝin sian amon al Eliza, lia amatino, kiu ĵus forlasis lin, kaj sekve li kroĉas sian vivon al ŝi por povi travivi. Siaflanke, ŝi ne ŝajnas esti tre interesita remalkovri sian antaŭan vivon kaj eniras ludon, kiun nun la viro proponas, fuĝante kun li al izolita loko, nome al kampadejo *La ruĝa sciuro*.

Kio okazus, se iun tagon oni decidus komenci vivi tute novan vivon, ĉar la nunan oni ne plu eltenas? Kiujn sekvojn tio povus havi por tiuj, kiuj amas onin? Kiajn ekstremojn povas atingi la amo, kaj kiom multe pli, kiam ĝi

ne plu estas reciprokata kaj evoluas al malsana obsedo? Jen kelkaj el la demandoj, kiujn la eŭska reĝisoro kuraĝas brile respondi en tiu ĉi filmo, sukcese montrata jam la 12-an semajnon en Roterdamo.

Julio Medem trenas nin tra la konscio, penetras la subkonscion kaj majstre malkaŝas la misterajn fadenojn, kiujn la destino foje teksas. Sed la ĉefa merito de la reĝisoro kuŝas en lia lingvaĵo. *La ardilla roja* estas io nova, kio elokvente pravigas la vortojn de la granda kartvela reĝisoro Sergo Paraĝanov, ke kino estas nova arto kun multo por esti ankoraŭ eltrovata. Mi aparte imponiĝis


de lia kapablo montri samtempajn agojn en diversaj lokoj sen turni sin al la kutimaj rimedoj. Kaj, analoge al *Bovinoj*, ankaŭ tie ĉi bestoj havas simbolan rolon. Kaj kial ne? Por Medem ĉiu el ni estas besto: bestoj en kaŝejoj, bestoj amantaj, bestoj suferantaj, bestoj serĉantaj, bestoj fuĝantaj. Ni ĉiuj estas parto de medio, kie unu nepre dependas de la aliaj, kie la regfadenoj de nia vivo interplektiĝas kun alies, kie ne vere facilas esti la arkitekto de sia propra destino.

Bonega komponado flanke de la geaktoroj, inter kiuj elstaras tiu de la ĉefrolulino, juna sukcesa aktorino hispana, kaj tiu de la kampadeja najbarino. La ĉefmuzikaĵo, kiu ne nur ornamas la filmon (cetere, la reĝisoro mem aŭtoris ĝian tekston, kies kompleta versio aŭdiĝas nur en la fermo), la solida skripto kaj la tre neordinara kunmeto de scenoj estas ankaŭ steluloj, kiuj faras el la tuto integran, brile rakontitan historion, mirindan detalaron. Kies tuton vi ne perceptos tuj, sed via rezono malkovrados post la filmspekto, eble ankoraŭ tagojn poste.

Se vin interesas la postkulisajfoĵoj de la vivo, ĝiaj fadenoj, kiujn kelkaj preferas nomi hazardo aŭ koincido kaj kie intuicio aperas kiel palpebla elemento, *La ruĝa sciuro* estas por vi.

Franĉjo Veuthey, Nederlando

2-A ELDONO



“Unika legolibro, plej bonveniginda kaj rekomendinda al ĉiuj studentoj de la Internacia Lingvo.”

Baldur Ragnarsson

Fabeloj, mirindaĵoj kaj internaciaj rakontoj sur pli ol 400 paĝoj . . .

Rotterdam: UEA, 1993 (dua korektita eld.). 431p. 21cm. Prezo: 36,00 gld. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.


La blanka cikonio revenas!

Revenas cikonioj* al la ĉieloj de Lombardio, regiono de norda Italio. Meze de marto ĉi-jara komenciĝis la reenkonduko de tiu mirinda aer-besto. Temas pri scienca projekto, kiu apartenas al internacia programo revenigi tiun specon de birdo en la tutan okcidentan Eŭropon.

Kvardek tiaj birdoj venis aviadile* de Svislando al Italio; dek du estas por Lombardio. Tiuj ĉi trovis taŭgan medion en la Natura Parko “Bertone”, starigita antaŭ dek jaroj: mirinda loko, kiu havas kiel centron la riveron Mincio [elparolu minĉo] kaj la lagon Garda, kun kvincent hektaroj* da verdaj montetoj kaj marĉoj*. Dum la unua periodo oni tenos la cikoniojn en bird-ejoj, por ke ili al-klimat*-iĝu.

Oni esperas, ke efektiviĝos novaj konstantaj kolektiĝoj nestiĝantaj*, por malebligi la iom-post-ioman malaperon de tiu birdospeco en la okcident-eŭropaj landoj (okazinta precipe pro klimataj mediaj sanĝoj).

Giancarlo Baraldi, Italio



Rimarko

En la artikolon “Ek al Usono!” de *KONTAKTO* n-ro 140 (1994:2) ensteligi misklarigo.

La malmallongigo de FIFA en Esperanto estas ne Federacio Internacia de Futbal-Asocioj sed **Federacio Internacia de Futbalo Amatora.**

WorldCupUSA94™



Viaj reagoj kaj sugestoj estas bonvenaj ĉe nia adreso. La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la legantoj.

Schindler


Laŭ mia opinio la plej granda avantaĝo de la nigra-blankeco de *La listo de Schindler* (KONTAKTO 140, 1994:2) estas, ke ĝi preventas rigardi la kinaĵon kiel prezenton de faktoj, dum ĉi tiujn faktojn eĉ pleja provo povas nur skizeti. Laŭ tiu argumento estas konsekvence ekuzi koloron, kiam la filmo glite transiras al sceno kun realaj travivintoj. Kaj ke tia sceno entute ekzistas ne esprimas, ke "la morto de milionoj da judoj havis sencon", sed male savi kelkajn el ili havis sencon, eĉ se Schindler mem ne povis kontentiĝi pri tio. Por la menciita lingva problemo mi ne vidas solvon: Oni devus aŭ verki kaj produkti la filmon tute en la originalaj lingvoj aŭ rezigni pri la dezirata efiko de original-lingvaĵoj. Do oni nur povus dubli la filmon en la germanan, kaj ĉi tiel mi spektis ĝin, tute ne spertante lingvan malkoherecon.

Flanke mi deziras esprimi la opinion, ke la ĉi-foja rakonto de Claude Piron [*La superulo*, KONTAKTO 140, 1994:2. Red.] ne atingas la kvaliton de la antaŭaj — ĝi estas tro kliŝa.

Reinhard Pflüger, Germanio

Proverboj

Ja estas laŭ mi neeble meti proverbojn en kategoriojn, kaj tio estas rimarkebla ĉe diversaj anguloj de la artikolaro de Bernard Golden. Ĉe 1. d. (2-a parto, KONTAKTO n-ro 140) enŝteliĝis eĉ tute malĝustaloka ekzemplo: "Li elpelas la diablon per Baal-Zebub", konata de mi kiel "Er treibt den Teufel mit dem Belzabbu aus." Laŭ mia scio, Belzebuto estas alia nomo por la diablo, kaj ĝi signifas, ke iu provas anstataŭigi malbonan aferon per io alia same malbona. Do ne temas pri la maniero forigi la diablon, sed pri tio, ke iu agas stulte.



facila

aviadilo: flugmaŝino
cikonio: birdego, kiu ofte vivas sur tegmento; antaŭe infanoj kredis, ke ĝi alportas la novnaskitojn
hektaro: kampo de cent oble cent kvadrataj metroj
klimato: tuto de veterkondiĉoj de unu regiono
marĉo: akvujo de senmova akvo kun mola tera subo
nesto: birdo-ovejo, birdo-hejmo

Ĉu vi volas korespondi?

Skribu al **Koresponda Servo Mondskala** kaj donu la jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj dezirataj, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Ĉiam kunsendu internacian respondkuponon, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon.

KSM pludonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi devos do ricevi letero(j)n rekte de ili. Se post kelkaj semajnoj tio ne okazis, skribu denove al KSM por plia provo.

Koresponda Servo Mondskala
B.P. 6
FR-55000 Longeville-en-Barrois
Francio



Iam en antaŭa numero oni disputis pri "KONTAKTO sur reciklita papero", kaj laŭ mia memoro, Joĉjo Truong tiam respondis: "Kiu volas recikli KONTAKTON?!" Tio estas stulta, ĉar reciklita papero signifas, ke ĝi antaŭe estis io alia, ekzemple fi-
varbilo, taggazeto aŭ simile; reciklita papero ne nepre estas reciklota papero. (Por kio ni havas tiom da participoj, se ili estas konfuzataj?) Do: mi ne deziras forĵeti KONTAKTON post legado sed tamen dezirus ĝin sur papero pli agrabla por la medio, t.e. reciklita kaj blankigita per oksigeno, ne per iu klorajo. Se necesas, oni ja povas aldoni nur parton de reciklaĵo.

Alia malbona trajto de la nun uzata papero estas, ke ĝia tro glata surfaco malhelpas la solvodon de krucvortenigoj, ĉar oni nur malfacile povas skribi sur ĝin, kaj ne povas bone forigi malĝuste skribitajn literojn. Kaj en hela lumo ĝi reflektas tro multan lumon, ĝenante la legadon.

Enhave KONTAKTO tre plaĉas al mi, precipe eroj kiel *Nasreddin Hoĝa* kaj *Lalande*. Bedaŭrinde tiu ĉi lasta nun ĉesis. Ĉu vi povas enmeti simile belan rakonton en postaj numeroj?

Volframo, Germanio

Red.: La deziro pri publikigo de nova rakonto tra kelkaj numeroj de KONTAKTO estas iom dividita: kelkaj legantoj sciigis, ke ili ne deziras tian. Ĉiukaze, ni esperas ricevi pliajn opiniojn.

Sankcio por Zoran

En KONTAKTO n-ro 140 (1992:2) Zoran Ćirić publikigis longan reagon, precipe pri la sudslava historio. Li nomas sian rakonton "Serba vero". Mi ne kredas, ke vero povas havi naciecon. Jen alia perspektivo:

Unue Zoran asertis, ke slovenoj jam en 1918 deziris vivi en Jugoslavio. "Se ne, kial ili akceptis

tion? Se la jugoslavia armeo estis agresa armeo, ankaŭ slovenoj tiukaze estis agresuloj, ĉar slovenaj junuloj militservadis en la jugoslavia armeo!" Sed oni ĝenerale ja scias, ke militservo plej ofte ne estas libervole farata de junuloj. Se Zoran vidas en militservo nepre favoran amon al la ŝtato, tiam li estas aŭ tre naiva aŭ nazia. Vere, en 1918 Slovenujo estis ne subjekto, sed objekto en la internacia politiko.

Pri la turka okupado: "La afero estis ege simpla: kiu akceptis islamon restis viva, kiu ne [...] estis mortigita! Multaj veraj kristanoj pereis tiutempe." Do la "neveraj" islamiĝis, kaj la piuloj martiriĝis? Certe ne. La otomana ŝtato estis multe pli tolerema ol la tiutempaj "kristanaj" ŝtatoj. La Zorana "argumentado" cetere ne klarigas, kial la multegaj popoloj de Balkanoj (hungaroj, bulgaroj, grekoj ktp) sub la turka regado nek formortis, nek islamiĝis.

Trie, Zoran sentas sin "nur" serbo, ne plu jugoslavo. Sed Jugoslavio laŭ la Belgrada opinio ja ankoraŭ ekzistas kaj konsistas el Montenegro kaj Serbujo.

"Ekzistas malfacilaj patrujoj. Unu el ili estas Germanujo. Sed ĝi estas nia patrujo" diris la unua Federacia Prezidanto de FRG, Theodor Heuss. Post la teruraj nazi- kaj armekrimoj nome de la germana popolo, estis kaj estas ne facile por germanoj trovi ĝustan rilaton al sia etna komunumo.

Ankaŭ la restanta Jugoslavio troviĝas en tia situacio. Mi esperas, ke Zoran lernos umi kun tia sia patrujo. Kaj li bonvole indiku, ĉu tiuj estas liaj personaj opinioj aŭ tiuj de la Serbia Esperanto-Ligo, kies prezidanto li estas. UEA trovi vojon, kiel reagi al tia pozicio sen endanĝerigi la UEA-neŭtralecon aŭ la SEL-aligitecon.

Marcus Sikosek, Germanio

Baleno

Daniel A. Cuthbert, Usono

Antaŭ multaj jaroj, kiam la Tero ankoraŭ estis juna kaj la homaro ankoraŭ ne estis kreita, vivis en la vasta oceano granda Blua Baleno. Tiu ĉi baleno havis gigantajn proporciojn – verŝajne la plej granda estaĵo iam vivinta sur la Tero. Dum jaroj ĝi naĝis tra la profundaj bluaj akvoj, travivis per la malavareco de la oceano sub la malhele griza ĉielo. En tiuj foraj tagoj la ĉielo estis ŝtonkolora kaj, kvankam la oceanoj estis vivohavaj, nur iom da lumo penetris la surfacon de la maroj.

Estis tiu grizkolora ĉielo, kiu perpleksigis la balenon, ĉar ĝi ne povis kompreni, kial tiel bela mondo devas kuŝi sub tiel malgaja ĉielo. Tiu ĉi problemo mirigis la balenon kaj, kiam li maljuniĝis, iĝis la ĉefdemando de lia ekzisto. Balenoj estas, kiel vi sendube scias, filozofoj kaj bestoj pli aĝaj kaj saĝaj ol ni. Kaj ĉi tiu baleno estis vera majstro de logiko.

Post jardekoj da meditado, li trovis respondon al sia problemo. Dio (tiu ĉi baleno kredis je Kreinto) estis estaĵo de multaj talentoj kaj oficoj. Li kreis la mondon, en kiu la baleno vivis, kiel projekton flankan de io pli, pli granda... Kvazaŭ ŝatokupe, se vi tiel preferas. Li ne havis sufiĉe da tempo fini la planedon, kiam pli urĝa afero subite alvokis Lin. Parton de la Tero, la ĉielon, Li ne sukcesis fini. Li apenaŭ havis tempon por krei la balenon, kiu devus fini la taskon.

Nun la filozofiema baleno havis ne nur respondon pri la koloro de la ĉielo, sed ankaŭ kialon por sia propra esteco kaj granda saĝeco. Li estis metita sur la Teron, kvazaŭ Dio, por fini tion, kion tiu mem ne povis fini.

La baleno nun havis celon, kaj komencis pensi, kiel trovi la solvon. Kompreneble, ĝia Kreinto volis, ke la ĉielo bliuĝu. Pro kiu alia kaŭzo Dio estis farinta la balenon mem blua? Tio estis signo. La baleno ja sciis, ke la akvo, en kiu li loĝas, estas preskaŭ de lia sama koloro, kaj ke li havas truon sur la pinto de sia kapo, tra kiu li povas pafi akvon. La belecon en tiu ĉi ideo la baleno tuj vidis – li farbus la ĉielon blua, per la akvo kiel kolorilo kaj si mem kiel peniko!

Li plonĝis al la fundo de la maro kaj malfermis sian kavernan buŝegon, enbuŝigante tiom multe da akvo, ke la oceanoj retroiris de la bordoj. Dum li naĝis surfacen, li pliigis la premon ene de si kaj tiam, kun la sono de miliono da kanonoj, li ekblovis la akvon de sia blovtruo ĉielen. La blua fluo akva iris supren, supren, supren, kaj tiam, frapinte la grizan kupolon, sterniĝis ĉien ĝis kovri la tutan ĉielon per mirinda blua kolornuanco.

Kaj tial, miaj amikoj, estas kial la ĉielo estas blua, balenoj ŝprucigas, kaj akvo falas de supre.

(Aperis unuafoje en la literatura gazeto de la Gilforda Liceo sub la nomo "Whale". Ĝin tradukis al Esperanto la aŭtoro mem).

